



MARTINUS
INSTITUT

Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Zamenhof:

Letero al J.M. Schleyer,
1887

Martinus:

Pri mia interpreto de
la grandaj analizoj de
la vivo

Erik Gerner

Larsson:
Martinus 8

Johan'-Luko Tortel:

L.L. Zamenhof kaj
Palestino

Arpad Ratkai:

Unua Libro, 125 jara
jubileo

Aleksander

Korĵenkov:

Unua Libro,
26-an julio 1887

ESPERANTO

125

1887-2012

Letero de Zamenhof al J.M. Schleyer, 27.11.1887

Estimata kaj estiminda sinjoro!


Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimo por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro ne timante la ridegon de l'amaso. Mi mem plej bone komprenas kiom Vi devis suferi, ĉar mi mem tra iris similan vojon: kiam mia laboro jam estis preta, mi kvar jarojn devis atendi kaj esti celo de senĉesa ridado, – ĝis mi ricevis la eblon eldoni mian verkon.

Kiam mi antaŭ 5 jaroj aŭdis pri la Volapük, mi ne forĵetis mian laboron, ĉar la konstruo de Volapük ŝajnis al mi ne tute praktika; mi diris al mi ke lingvo tutamonda devas esti antaŭ ĉio komprenebla, kaj la tuta granda materialo, kiu jam per si mem fariĝis internacia, devas resti ne tuŝita. En lingvo, kiu devas fariĝi tutamonda, oni povas krei nur la malgrandan parton, kiu estas malsimila en malsimilaj lingvoj; ĉio cetera devas resti ne tuŝita. Ĉar nenia persono estas tiel leĝdonanta por krei lingvon por tuta mondo laŭ sia volo, kaj tuta vivo de homo ne estas sufiĉa por nove krei la tutan senfinan multon da vortoj de lingvo, kun ĉiuj nomoj de l' landoj kaj urboj, kun ĉiuj senombraj nomoj teknikaj ktp.

Mi estimas Vian noblan deziron porti utilon al la homaro; kun plena estimo por la aŭtoro de Volapük, mi laboras ne kontraŭ la Volapük, sed por la ideo. Sankta estas por mi la ideo de lingvo tutamonda, kaj en kiu ajn formo



L.L. Zamenhof
(1859-1917)



J.M. Schleyer
(1831-1912)

de l' homaro ĝin havos, mi estos kontenta kaj feliĉa. Se oni montros al mi ke mia laboro estas malutila al la ideo, mi mem detruos mian laboron, kvankam mi oferis al ĝi la plej bonan parton de mia vivo; se la juĝo de l' mondo estos ne decida, la "Lingvo internacia" restos kune kun la "Volapük", kiel du amikoj, kiuj havas unu celon en la vivo. Aŭ unu de la lingvoj mortos per si mem, aŭ la homaro havos du lingvojn, kaj eĉ tio estos por la mondo multe pli bone, ol resti tute sen lingvo tutamonda.

Pardonu ke mi skribas al Vi en mia lingvo; mi faras ĝin ne pro malĝentilo, sed por doni al Via provon de mia lingvo.

Kun la plej granda estimo

Esperanto

Pri mia interpreto de la grandaj analizoj de la vivo

de Martinus



1. Enkonduko

Same kiel ĉe miaj antaŭaj prelegoj, ankaŭ ĉe mia prelego en Borups Høj-skole (Popolaltlernejo de Borup) la 22-an de oktobro 1933, mi povis senti ĝojon renkontante grandan, afablan kaj interesitan partoprenantaron. Tiu mia ĝojo fariĝis des pli granda, ĉar ne mankas al mi kompreno pri tiu pacienco kaj streĉo, kiu estas la kosto de miaj aŭskultantoj por sekvi la grandajn kaj vastajn temojn. Por la aŭskultantoj memkompreneble estus pli facile, se mi ne por miaj prelegoj elektus, kiel mi fakte faris, la grandajn analizojn pri la vivo, sed kontraŭe pri-traktus la plej ĉiutagajn kaj simplajn temojn, kiuj estus pli proksimaj al la horizonto kaj kutima rezonkapablo de la aŭskultantoj. Tiukaze miaj prelegoj efikus pli kiel distro ol instruado, sed la partopreno estus eĉ pli granda, ĉar la komprenado postulas malpli da intelektaj kvalifikoj. Sed ne estas mia misio tiel krei distron, elpensitan sensacion aŭ klarigi temojn, pri kiuj jam troproduktiĝas detaligoj kaj interpretitoj. Kontraŭe mi ricevis la malfacilan taskon alparoli la absolute “altintelektajn” homojn. Per “altintelektuloj” estu komprenata individuoj, kiuj *posedas grandegan materialon da “sentospertoj” kaj responda evoluinta logiko.*

Estulo absolute ne fariĝas vere altintelekta pere de nuraj “*inteligentospertoj*”. Laŭ materiisma vidpunkto tiu estulo povas esti tre elstara, esti doktoro aŭ profesoro – kaj

memkompreneble ni donu al tio ĉian respekton, kiu apartenas al tiu – sed tia estulo laŭ absoluta vidpunkto ne estas altintelekta. La manko de sentospertoj rezultigas, ke meze en sia granda intelektita scio tia estulo kelkfoje eĉ povas aperi treege primitiva.

2. La sentohomo kaj la inteligentohomo

Sed kion oni komprenu per “*inteligentospertoj*”? – Kaj kion oni komprenu per “*sentospertoj*”? –

Per “*intelligentospertoj*” oni komprenas ĉiajn ekkonojn, kiuj estas rezulto de kalkulado, pere de legado kaj pere de instruado. Kaj estas memkompreneblaĵo, ke homo povas atingi multon rilate al scio surbaze de tiuj tri faktoroj. Sed eĉ se tiu scio troviĝas en kulmina formo malantaŭ doktora aŭ profesora titolo, tiu scio ne estas ia absoluta aŭ fina scio, kiam temas pri *la eternaj faktoj*, kio alivorte signifas *la realajn bazajn analizojn de la universo, de la senmorteco de la individuo, de la estiĝo de la sorto, de la mistero de la amo kaj kreokapablo.* Kiam temas pri reala scio pri tiuj aferoj, *la inteligentohomo* estas senscia, estas primitiva estulo, ĝuste ĉar la travivado de la menciitaj realaĵoj neniel estas atingebla nur pere de la inteligento aŭ komprenopovo. La travivado de tiuj realaĵoj vibras en energiformoj, kiuj estas traviveblaj nur per la sentokapablo, kaj kiuj sekve fariĝas ne “*intelligentospertoj*”, sed “*sentospertoj*”. “*Intelligentospertoj*”, kio en ĉi tiu kazo

signifas “teoriojn”, ne havas signifon por individuo, kiu ne havas kapablon utiligi ilin aŭ tiri konkludojn el ili, kaj tiel same “sentospertoj” estas senvaloraj aŭ sensignifaj por individuoj, al kiuj responde mankas inteligento por el tiuj eltiri la ĝustajn konkludojn. De tio plue sekvas, ke ankaŭ nura “sentohomo” ne povas veni al la reala analizo de eternaj faktoj, sed ĝi diferencas de la “inteligentohomo” per tio, ke dum ĝi okupas sin pri la menciitaj eternaj faktoj kaj estas tre “religia”, ĝiaj ekkono, koncepto kaj eldiroj sur la religia kampo ne toleras absolute veran logikon aŭ intelektan analizon. Pro mankanta inteligento aŭ percepto pri logiko la sentospertoj de tia homo kreas en ĝia konscio ekkonon aŭ koncepton, kiu efektive estas nelogika, kaj tial tia individuo aperas kiel “fanatikulo”, kvankam ĝi ne mem konscias pri tio. Ĝi asertas tiun sian supozate ĝustan kaj seneraran koncepton aŭ kredkonfesion kiel absolute “solan feliĉigan” samtempe kun tio, ke ĝi montras ĉioregan netoleremon al ĉiu ajn koncepto aŭ analizo, kiu devias de ĝia propra kompreno. Kaj ĉar ĝi ne havas evoluintan inteligenton aŭ kapablon analizi, ĝia netoleremo aŭ indigno kontraŭ ĉiu fremda koncepto tute ne influigas, senkonsidere, kiel ajn logika kaj konforma al la vero kaj la realo estas tiu fremda koncepto.

3. La altintelekta homo

Kiel ni vidis ĉi tie, inteligento sola aŭ sento sola ne povas malfermi la aliron por “vidi Dion”, kio siavice signifas vere koncepti kaj kompreni la eternajn faktojn. Necesas tute alia konsci-kombino. Kaj ĉi tie ni venas al tria speco de individuoj, nome tiuj, kiuj sur la sentokampo havas spertomaterialon reguligitan aŭ regatan de tiom adaptita logika percepto aŭ klara inteligento, ke pro tio ili povas en sia propra konscio senti la vivon kaj staton, malĝojon kaj

ĝojon, suferon kaj malfeliĉon de aliaj estuloj. Estuloj, kiuj ĝis elstara grado atingis tiun staton, kiu siavice en sia kulmino estas la samo kiel la neskeuebla bazo de la absoluta feliĉo, nome “la ĉioamo”, ne povas manifesti penson, agon aŭ movon sen tio, ke samtempe ili sentas ties efikon al iliaj ĉirkaŭaĵoj. Tiaj homoj sekve sentas, ke malbonfarado al aliaj vivaj estuloj doloras ilin mem; kaj sekve, laŭ grado respondanta al la forto de tiu sento ili ne povas fari malbonon al alia homo. Ili ne povas mortigi, ĉar tro altgrade ili sentas la ponardpikon en propra brusto. Ili helpas eĉ la plej etan beston aŭ estulon el eventuala viddanĝero kun samaj respekto, ĝojo kaj amo, kiel se estus infano el propra raso. Tiaj homoj fariĝis kvazaŭ *revelacio de Dio*, “kreitaj laŭ lia bildo similaj al li”.

Tiaj individuoj do havas kapablon senti vibrojn sur kampoj, kie la granda plimulto de la homoj de la tero estas pli aŭ malpli nesentemaj kaj sekve laŭ respondanta grado estas ankoraŭ dormantaj estuloj sur tiuj kampoj. Tiel pro tiu sia evoluinta sentokapablo kaj respondanta logika percepto la unue menciitaj estuloj ĉiutage akiras spertojn sur kampoj, kie kiel dirite la aliaj estuloj ankoraŭ estas pli malpli dormantaj, kaj sekve la altintelktuloj ekzerciĝas pri speco de komprenado aŭ rezonado, pri kiu la plimulto de la terligitaj krudaj materiismaj estuloj pro sia ankoraŭ primitiva sento- kaj pensmaniero sur superfizikaj kampoj devas esti tute nekomprene- m, eĉ tute sendepende de tio, kiom ajn ili estas ekkoneblaj kiel sciencistoj en la pure fizikaj kampoj. Kaj ĝuste surbaze de tio ni devas agnoski, ke la unue menciitaj estuloj estas la veraj “altintelektuloj”.

4. Altintelekteco aŭ la afero esti “unu kun la Patro”

Laŭ absoluta kompreno “altintelekta” estulo estas individuo, kiu sentas la

vivon de ĉiuj aliaj estuloj pulsadi en sia propra interno, kaj kiu samtempe inteligentece kaj egalpeze kontrolas tiun senton, tiel ke la sekva konduto aperas en perfekta harmonio kun la eternaj leĝoj de la vivo. Praktike dirite la universo fariĝis identa kun ĝia propra organismo. Tia homo sentas sin *“unu kun la Patro”*.

Senti sin *“unu kun la Patro”* do alivorte signifas, ke oni havu tiom evoluantan sentokapablon kaj tiel elstaran inteligenton aŭ logikan percepton, ke en neniu okazo oni blinde sentu sin supereca rilate al la eternaj leĝoj kaj en tia blindeco praktiku negativan kritikon kaj kontraŭon al aliaj estuloj, sed kontraŭe en plene veka tagokonscio spertu la vivon kiel identan kun la eterna fakto, ke *“ĉio estas tre bona”*, kaj harmonie kun la plej profunda signifo de la vorto eldiras el siaj plenaj animo kaj spirito: *“Patro plenumiĝu ne mia, sed via volo”*.

Esti *“altintelekta”* do signifas – ne surbaze de kredo, sed surbaze de absoluta scio – ripozi en tiu dia trankvilo, kiu estas la sola neskeuebla kaj sekve absolute plej alta kaj vera formo de vivo.

5. La perfekta koncepto pri primitiva pensklimato

Paroli negative pri io, malbeni kaj esprimi ion per *“diabloj”*, *“diablaĵo”*, *“la malbono”*, *“puno de infero”*, *“sendieco”*, *“infanoj de Satano”* ktp., estas pensklimato, kiun povas krei nur individuoj, kiuj ja havas sufiĉe da sento por senti la ĉeeston de tiuj realaĵoj en la ĉiutaga vivo, sed havas tro malgrandan inteligenton aŭ logikan senson por percepti la menciitajn realaĵojn en ilia vera identeco kiel nemalhaveblaj eroj en la dia kreado de la eblo manifesti la plej altan amon. Tiuj realaĵoj en la eterna monda aranĝo do fariĝas tiuj fundamentoj, sur kiuj la ponto de lumo tra ĉia vivo kaj ĉia

estado estas bazita. Kiel sekvo de tiu mankanta logika senso ankaŭ la vido de tiuj estuloj pri la realaj faktoj fariĝis mankohava. Plene mankas ĉe tiuj individuoj tiu nobliĝo, kiu estas la reala vido de la vera identeco de tiuj menciitaj realaĵoj kiel malhaveblaj laŭplanaj kaj laŭcelaj eroj en la dia kreado de la amo, aŭ la fundamento aŭ bazo de la lumo. Tiel ilia koncepto pri la absoluta realo de la okazaĵoj fariĝas *iluzio bazita sur nenobla sentosperto*. Ĉar nenobla sentosperto plue estas la samo kiel *“malamo”*, ankaŭ la nomigo de la menciitaj realaĵoj fare de la menciitaj individuoj montriĝas kiel malamaj esprimoj. La esprimoj *“la malbono”*, *“puno de infero”*, *“infanoj de Satano”* kaj ankaŭ iliaj konceptoj, ke la individuoj supozate apartenantaj al tiuj realaĵoj kompreneble devas *“bruliĝi”*, *“turmentiĝi”* aŭ suferi *“la plej krudajn punojn de la infero”* ja reprezentas la klimaton, kiu ja ne estas tre inspira por la ago *“turni al tiu, kiu frapas la dekstran vangon, ankaŭ la alian”*. Tio estas pensklimato, kiu havas pli da rilato kun malamo ol kun amo. Sed ĉar ĝia apero ja ŝuldiĝas al tro malgranda inteligento kompare kun sento, kio plue estas nescio ĉe ĝia praktikanto, do ĉi tie klare vidiĝas, ke tia praktikanto nenial povas esti *“altintelekta”*, senkonsidere kiom da gradoj da scio ĝi eble posedas sur aliaj kampoj. Kaj la difila kompreno: *“Pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras”* estas vid-ebla kiel *“altintelekta”* koncepto pli ĉi tie ol en iu ajn alia kazo.

6. Pri la nocio, ke “la vojoj de Dio estas neesploreblaj”

Esti *“altintelekta”* do estas la samo kiel esti *“ĉioama”*, kio cetere estas la samo kiel *kun kompreno ami ĉion kaj ĉiujn*. Tia estulo ne povas kritiki, pensi negative aŭ agi malice kontraŭ iu aŭ io, ĝuste ĉar kiel fakto ĝi sentas kaj vidas *Dion* kiel la plej profundan originon en

ĉia formo de manifestado, en ĉia formo de kreado, en ĉia formo de travivado.

Koncepto, kiu nur parte konas Dion kiel originon de la kreado kiel tuto, malagnoskante la identecon de Dio kiel farinton de ĉio, kio aperas al la konceptanto kiel “*neperfekta*”, “*erara*”, “*malbona*”, “*aĉa*”, “*malagrabla*” ktp. kaj atribuas tiujn realaĵojn al unu aŭ pluraj memstaraj originoj apartaj de Dio, estas ja tute sen ia intelekta kompreno pri la realaj analizoj kaj leĝoj de la kreo-mistero. Estas ja ankaŭ tiel, ke neniel la kreantoj kaj adeptoj de tia koncepto povas per ia ajn formo de matematiko demonstri aŭ stabiligi ties identecon kiel absolutan veron aŭ kiel esprimon de la plej altaj justo kaj amo kaj sekve devis anstataŭigi tiun mankon per la spirita “anestezilo”: “*La vojoj de Dio estas neesplorableblaj*”. Kaj sub la influo de la imago aŭ hipnoto kreita de tiu rimedo ilia neperfekta sento esprimiĝas en miskompreno, indigno aŭ malamo al tiuj estuloj, kiuj komencas havi talenton por povi “*explori la vojojn de Dio*”.

7. Opinio, kiu sugestias al la kredo je la morto anstataŭ al la kredo je la vivo

Malantaŭ la antaŭe menciitaj esprimoj “*la malbono*”, “*puno de la infero*”, “*infanoj de Satano*” ktp. ekzistas veraj realaĵoj, kvankam en tute alia signifo ol tiu prezentita de la neamemaj estuloj, kaj tial tiaj individuoj, kiuj tute kontestas la ekziston de tiuj realaĵoj kaj eĉ tute kontestas Dion aŭ ĉion, kio povas nomiĝi superfizika, ankaŭ ne estas konsiderendaj kiel “*altintelektaj*”, ĉar ilia kontesto ja elmontras kompletan mankon de senta spertomaterialo. Pro tiu manko ili vivas surbaze de la opinio, ke la solvo de la vivo estas trovebla en *mezuroj*, *pezoj* kaj *vibroj*. Ili sekve estas tute sensciaj pri la kria malharmonio kun la realo, en kiu troviĝas tiu alia kompreno. Se la solvo de la enigmo de

la vivo vere troviĝus en *mezuroj*, *pezoj* kaj *vibroj*, ekzistus ja nur “*materio*”, “*substanco*” aŭ “*kemiaĵoj*”.

Sed ĉu oni iam vidis, ke eblas igi materion, amasaĵon de substancoj aŭ kombinon de kemiaĵoj pensi memstare, kalkuli aŭ analizi? – Ĉu maŝino estas inventebla kaj kreebla sen la bazo de viva “io” ekipita per tiuj inteligento kaj scio, kiuj kondiĉas la kreon de la inventaĵo? – Maleble! Ĉiu kreita afero ankaŭ kondiĉas kreinton. Sed esplorado, kiu celas nur trovi la solvon de la mistero de la vivo en mezuroj, pezoj kaj vibroj, neniel povas esti “*sciencia*” laŭ reala kompreno, ĉar, kvankam nekonscie por la koncernaj individuoj mem, ĝi ja estas bazita precize sur opinio aŭ koncepto, *laŭ kiu la aferoj estiĝas per si mem*, opinio, kiu akceptas kreadon sen kreanto, opinio, kiu faras la substancon la plej alta origino de la estado kaj sekve sugestias al kredo je – la morto – anstataŭ je la vivo.

8. La materiismaj esplorantoj kaj la ĉioamo

Kaj estas memkompreneblaĵo, ke laŭ absoluta kompreno tiaj estuloj ankaŭ ne povas nomiĝi “*altintelektaj*”, senkonsidere kiom ajn ili estas konsidereblaj kiel reprezentantoj de la *moderna scienco*, kiu kiel rezulto havas nur mezurojn, pezon kaj vibrojn. Ĉi tio ne estas dirita por subtaksi la menciitan sciencon, kiu ja kiel jam esprime en miaj aliaj verkoj, estas la komenciĝo de “*la sankta spirito*” aŭ sole vera kaj absoluta scio. Kontraŭe tio estas dirita por substreki la veron aŭ la faktajn cirkonstancojn kaj per tio kontribui al la dissolviĝo de tiu sugestio, kiu en formo de blinda fido al la tera scienco sur kampoj, kie ĝi ne estas kompetenta, faras materiismon moderna kaj kulturata novajn hipnotajn dogmojn, kiuj certegrade estas ankoraŭ pli naivaj ol la malamataj religiaj dogmoj, ĉar iugrade tiuj

laste menciitaj laŭ ia maniero estas en kontakto kun la publiko aŭ la realo per tio, ke ili metas kreinton malantaŭ la kreitaĵon, dum la “sciencaj” dogmoj laŭ ne malgranda grado pretervidas ĉion, kio troviĝas ekster la atingodistanco de la kutimaj “sciencaj mezurinstrumentoj”, nesciante ke neniam “*la kreanto*” povas videbliĝi en mikroskopo aŭ teleskopo, sekve de kio estas nur plilongiĝo de la vido de – ne li mem – sed liaj kreaĵoj, kiujn tra tiuj instrumentoj ili havas antaŭ si. Tiel esploristoj de la ĉi tie menciitaj kategorioj ankoraŭ ne akceptas, ke “*la kreanto*” povas videbliĝi nur tra unu sola tute alia speco aperanta “*instrumento*”, nome “*la ĉioamo*”, kiu estas la sole adaptebla al tiu “*ondolongo*”, kiu rekte malkaŝas la “*kreanton*”, t.e. *la solvon de la eterna origino de la vivo aŭ estado*.

9. Estuloj, kiuj rezonas partiece kaj sekve ne povas “vidi Dion”

La vojo por “*vidi Dion*” do iras nur tra “*la ĉioamo*”. Nur tiu sola donas tiun ekvilibron en la menso, tiun sendependecon, kiu antaŭkondiĉas, ke la sensado ne fariĝu partiece, t.e. ne fariĝu tro granda avantaĝo sur iuj kampoj, kaj respektive malpli granda avantaĝo sur aliaj kampoj, kio en ambaŭ okazoj rezultigas falsan dibildon. Same en siaj grandaj kiel ankaŭ en siaj etaj detaloj la reala di- aŭ mondbildo esprimas la plej subtilan logikon, kaj tio estas nepre avantaĝa sur ĉiuj kampoj kaj sekve estas universala defendo por ĉiuj vivaj estuloj, por ĉio kaj ĉiuj. Tial la individuo devas veni en kontakton kun tiu bildo, alie ĝi ne estas sur sama “*ondolongo*” kiel la baza tono de la universo kaj sekve ne povas senti aŭ travivi sur tiuj kampoj, kun kiuj ĝi ne estas en kontakto. Ni ĵus vidis, kiel sen responde logika senso la sentospertoj igis sian originon rezoni partiece, malbeni ion kaj beni alion. Ĉar ĉio ja estas esprimo de Dio,

tio signifas, ke tiaj individuoj malbenas ion de Dio, kaj laŭ responde grado ilia mondkoncepto, ilia di-koncepto devas laŭ responde grado fariĝi neperfekta. Ilia talento por kompreni la veran misteron de la vivo estas ankoraŭ nur dormetanta.

Preskaŭ la samo validas por tiuj individuoj, kiuj havas tro grandan inteligenton kompare kun siaj sentospertoj. Ankaŭ ili rezonas partiece, ĉar ili kapablas kompreni nur rezultojn de pezoj, dimensioj kaj vibroj. Sed, ĉar Dio estas pli ol rezultoj de pezo, dimensioj kaj vibroj, ankaŭ tiuj estuloj ne povas “*vidi Dion*”. En tiu direkto ankaŭ ilia talento estas sama kiel tiu de la antaŭe menciitaj estuloj, tre latentaj.

10. La talento por travivado de Dio aŭ la universo

Kiel ni povas vidi, ĉi tie necesas talento por atingi “*ekvidi Dion*”, travivi *la realan mondbildon*, vidi la grandan solvon de ĉiuj enigmoj nome “*la viva io*”. Tiu talento do identas kun la kapablo sensi nepartiece, ĉar ĉia partiececo tuj estigas tro fortan inklinton de la koncepto de la individuo al la preferata kampo kaj responde forpuŝo de la nepreferata. Ĝia esplorado fariĝas transsalto de detaloj, kiuj estas malagrable malkaŝantaj por ĝi mem kaj troigo de detaloj, kiuj efikas male. Tia individuo neniel povas reprezenti centprocentan veron. La talento por travivado de la Dio aŭ la grandaj analizoj de la universo sekve postulas centprocentan ekvilibron en la menso, en la pensoj, en la konscio.

11. Simpatioj kaj antipatioj

Sed kio estas tio, kio estigas tiun malhelpan malekvilibron? – Kiel la antaŭa teksto montras, la kaŭzo estas tiuj troigitaj altiro kaj forpuŝo. Sed kio estas en ĉi tiu kunligo altiro kaj forpuŝo? – Jes, kiel en ĉiuj aliaj aferoj de la vivo ĝi havas “*elektran*” naturon. Altiro kaj

forpuŝo estas la samo kiel la sento de simpatio por kaj responde antipatio kontraŭ io aŭ alio en la ĉirkaŭaĵoj kaj ĉiutaga vivo de la individuo, kaj tial la menciitaj realaĵoj en la realo identas kun speco de pli alta formo de reala “*magneta*” funkcio inter “*la memo*” kaj la objekto por la simpatio aŭ antipatio. Kiel ĉio alia en la vivo tiu “*magneta*” funkcio aŭ altiro kaj forpuŝo estas subigitaj al certaj leĝoj. Se ĝi devias de tio, ĝi tuj rezultigas resonadan malharmonion, kiu en la menso aŭ konscio de la koncerna individuo esprimiĝas en formo de malekvilibro. En la ĉiutaga vivo tiu malekvilibro estas konata i.a. kiel “*enamiĝo*”, “*avareco*”, “*potencemo*”, “*vanteco*” kaj simile, kaj tiuj realaĵoj ĉiuj estas esprimo de granda avido aŭ granda simpatio pri la koncerna objekto. Tio alivorte signifas, ke por realiĝo de tiu tro forta simpatio de la individuo necesis uzo de energio aŭ forto pli granda ol nature necesa. Tiu fortosuperaĵo sekve mankas al la koncerna individuo sur aliaj kampoj, kaj sekve ne sur ĉiuj povas realigi tiun magnetan altiron, por kio ĝi estas destinita de la naturo. Sur tiuj kampoj la simpatio de la individuo fariĝas responde malforta aŭ mankohava. Tiu manko de pli alta forto aŭ energio povas kelkfoje esti tiel elstara, ke ĉi tie la individuo komplete fiaskas, estas tute senigita de simpatio. Sed tie, kie ne estas simpatio, povas esti nur antipatio. Kaj en tiaj okazoj tiu antipatio manifestas sin tra la konscio de la individuo en formo de: *malamo*, *koleremo*, *netoleremo*, *kalumniemo* ktp.

12. La spirita ekvilibro de la eterna paco, la sankta spirito aŭ la granda naskiĝo

Sed iom post iom tiuj malekvilibraj statoj reefikas al la individuo en formo de korpodifektiĝo kaj sufero. La eternaj leĝoj serĉas ekvilibron, kio plue signifas la travivadon de la individuo pri la baza

tono de la universo: “*la eterna paco*”, kiu estas precize la egala disdivido de la energioj de la naturo al la ĝustaj lokoj aŭ regionoj, kaj siavice tio donas al la individuo la travivadon de la en “*Livets Bog*” preparolita fundamenta travivado de “*la granda naskiĝo*”, kio estas la en la Biblio preparolita superombrado de “*la sankta spirito*” en permanenta formo. Kiam la individuo venas en tiun staton, ne mankas al ĝi en certaj okazoj energioj por travivi la vivon centprocente, ĉar en aliaj okazoj ĝi malŝparegis aŭ uzis tro multe da energio por la travivado de la vivo, kaj tial tiu lasta formo de travivado ne povis fariĝi centprocente ĝusta, ĉar per tiu tro granda energi-disvolvo ĝi necese fariĝis tro forta aŭ alivorte troigita. Ĉe malekvilibro aŭ tro multe aŭ tro malmulte da simpatio la individuo sekve ne povas travivi la normalan senton de sia propra ĉeesto en la universo, kaj tiu sento interalie estas la samo kiel la travivado de la solvo de la mistero de ĝia propra mio, ĝia identeco kun la senmorta vivo de Dio kaj kun la manifestado kiel tuto de la neskiebla ĉioamplaksa amrevelacio de Dio.

13. La plej granda malhelpo en atingi de la plej alta scio

Unu el tiuj statoj de malekvilibro, kiuj ĉefe povas akompani la individuon plej longe antaŭen en ĝia irado al la lumo por finfine fariĝi komplete malhelpo por travivado de la plej alta scio, estas la avido brili. Tiel longe, kiel la plej alta deziro de individuo estas povi brili pli ol aliaj tiu ĝia deziro trasaturas ĝian esploradon, eĉ tre ofte sen ke la individuo mem vere konsciis pri tio. Sekve tiu esplorado en la realo fariĝas pli “*vetkuro*”, granda batalo aŭ energidisvolvo por esti la unua por atingi scion kiun onia proksimumo prefere atingi nur tra si mem, ol ĝi fariĝas esprimo de reala inklino eduki sin en la granda amo aŭ en la afero “*ami sian proksimumon kiel*

sin mem”. La esplorado de tia individuo do ne fariĝas stimulo de ĝia propra rezignado avantaĝe al la proksimulo, sed kontraŭe *“akaparo”*, venkakirado de spirita havaĵo, manifestado de *avido pri oro*, fariĝi *“riĉulo”*, transigita al la spirita sfero. Tiaj estuloj fakte havus eblecon fariĝi *“la kapitalistoj”* de tiu sfero, se ne precize la avido brili estus la plej granda malhelpo por proprigo de la plej alta spirita riĉeco. La aliro por *“vidi Dion”* ne estas *“akaparebla”*, ne estas disponebla kiel *“premio”* por *“vetkuro”*, kiu estas stimulita aŭ portata de la timo, ke la proksimulo eble venos la unua. *“La regno de Dio”* ne estas objekto de konkurenco. Tio kompreneble ne signifas, ke tiuj individuoj ne povas proprigi al si aŭ *“akapari”* multe da scio, male. Sed ĉar ĉia reala spirita scio neniel povas fariĝi memtravivata tiel longe, kiel ĝi estas esprimo de *“akaparo”*, devas kontentigi vantecon, devas esti rimedo por atingi potencon, la spirita scio de tiuj individuoj fariĝas nur teoria tie, kie ĝi ne estas stagnita en dogmoj. *“La akaparita havaĵo”* estas nur malplenaj etiketoj por produktoj, kiujn ili neniam mem travivis. Ilia *“multe da scio”* aŭ supozate *“alta spirita nivelo”* estas nur ekstera brilaĵo, estas nur vico da *“bonaj vortoj”*. Sed kiel konate tiuj imponas aŭ *“ravas malsaĝulojn”*, kaj tial la ĉi tie menciitaj individuoj povas vere atingi ricevi adeptojn aŭ admirantojn, fariĝi gvidantoj de etaj *“religiaj unuiĝoj”* aŭ *“grupoj”* kaj sekve ricevi certan kontentiĝon de ilia vanteco.

14. “Kiu opinias, ke li staras, sin gardu, por ke li ne falu”

Sed nenio konstruita surbaze de iluziaĵo povas daŭre ekzisti, ankaŭ tiaj unuiĝoj, kiuj pli estas bazitaj sur kontentiĝo de vanteco kaj potencemo ol sur vera homamo, ankaŭ ne povas daŭre ekzisti. En kalumnio de envio kaj batalo pri la gvidado interne, kaj en malamo,

netoleremo kaj kontraŭeco ekstere al aliaj spiritaj movadoj, de kiuj ili timas *“konkurencon”*, ili neniel povas konservi sian reputacion kiel socio por *“sanktaj”*, *“kredantoj”* kaj *“savitoj”* kaj sekve unu post alia dissolviĝas tute per si mem. Sed *“la membroj”* riĉiĝis per bonaj kaj nemalhaveblaj spertoj, prenis ankoraŭ etan paŝon antaŭen al la kompreno de la vortoj de la granda mondliberiganto: *“Kiu opinias, ke li staras, sin gardu, por ke li ne falu”*.

15. Tiuj, al kiuj komencas proksimiĝi la ĉiela regno, kosma konscio aŭ la plej alta scio

Mia prezento ĉi tie de la menciita analizo kompreneble neniamaniere estas atako al iu ajn, ĉar plej altgrade mi ja komprenas, ke neniu povas manifesti aliajn agojn ol tiujn, kiuj estas esprimoj por la evoluŝtupo, sur kiu troviĝas ilia aganto. Cetere tia atako estus tute vana, ĉar absolute neniu el tiuj individuoj, al kiuj ĝi eble estus direktita sentus sin trafita. Pro tio la koncernaj estuloj estus tro memfidaj kaj certaj pri sia propra *“senerareco”* aŭ *“altigiteco”*. Kontraŭe ili multe pli facile konceptus la atakon kiel pravan rilate al aliaj religiaj movadoj, kiujn ili pro sia nekonscia timo de konkurenco pli aŭ malpli konceptas kiel *“falsajn”*, kiel hejmlokon de *“mallumaj potencoj”*, *“diablaĵo”* ktp. Sekve ĉi tiu analizo tute ne estas destinita al tiuj estuloj, sed kontraŭe al tiuj, kiuj komencis travivi aŭ sperti ĝian ĝustecon, kio signifas al tiuj, kiuj komencis eliri el la kurbaj vojoj kaj labirintoj de la vanteco, *al tiuj, kiuj komencis laciĝi de la brilado, al tiuj, kiuj efektive preferas resti neri-markitaj, al tiuj, kiuj komencis ekvidi, ke ili ne estas tiel alte evoluintaj, kiel ili kredis esti, tiuj, kiuj komencis senti sin malgrandaj, senti sin kiel infanoj en la religia scienco*. Estas tiaj estuloj, al kiuj komencas proksimiĝi al *“la ĉiela regno”*,

kio signifas “*la sanktan spiriton*”, “*kosman konscion*” aŭ *la veran scion pri la vivo*.

16. La kaŭzo, ke oni ne devas juĝi aŭ esti netolerema al aliaj homoj

Sed antaŭ ol mi pluiru, mi tamen deziras rimarkigi, ke la priparolitaj individuoj, kiuj apartenas aŭ al *la sentokategorio* aŭ al *la inteligentokategorio* kompreneble ne estu konsiderataj kiel “*pekkaproj*”, kiel malbonaj kaj malutilaj kuncivitanoj en la socio, kontraŭe, tia aserto estus ja same naiva kaj krie kontraŭ al la eternaj leĝoj, kiel aserto, kiu esprimas neneceson de infanoj en la socio. Kiel la infana stadio estas la pordego al la zono de la plenkreskuloj, tiel ankaŭ ĉiu por si tiuj du kategorioj estas esprimo de stadioj, kiuj kune estas la neevitebla pordego al tiu sfero de humileco, kiu estas la granda antaŭkorto de *la ĉioamo*, kaj kie troviĝas la absolute sola enirejo al “*la templo*”, “*la sanktejo*” kaj “*la plejsanktejo*”. Same kiel la infanoj survojas por fariĝi plenkreskuloj tiel ankaŭ la estuloj de la menciitaj kategorioj neeviteble survojas al *la granda scio*, survojas al “*la ekvido de Dio*”, al travivado de *la granda amo*, tute sendepende de tio, kiom ajn nuntempe eblas konsideri ilin netoleremaj, potencemaj kaj juĝemaj rilate al aliaj ktp. *Ĉiujn tiajn manifestaĵojn la vera aŭ perfekta homo povas koncepti kiel infanajn manifestaĵojn en la reala vivo aŭ kiel manifestaĵojn de individuoj, kiuj ankoraŭ “ne scias, kion ili faras”*.

Sed tiaj individuoj povas ankaŭ elmontri eĉ elstaran amon aŭ simpatian sur kampoj, kiuj apartenas al ilia propra konscia regiono, kiel familio, parencoj, amikoj, samkredanoj kaj ankaŭ al aferoj, kiujn ili konceptas precize kiel “*feliĉigajn*”, kvankam ili ja ankaŭ povas esti tre nesentemaj aŭ kondamnaj al ĉio, kio havas por ili fremdan naturon.

Oni ankaŭ ne forgesu la grandiozan utilon, netakseblan sinoferon kaj batalon eĉ ofte kun la vivo kiel enmeto, kiujn en formo de materia scienca esplorado granda parto de la estuloj de la menciitaj kategorioj realigas por la homaro. Ĉiuj negativa kritiko, netoleremo kaj *sento de supereco* rilate al la estuloj de la menciitaj kategorioj sekve povas esti esprimo nur pri pensklimoto, kiu montras, ke ankaŭ ĝia posedanto ne havas tiun humilecon aŭ estimon al ĉio kaj ĉiuj, kiu rezultigas la talenton por kompreno kaj travivado de *la vera vivo*, *la eterna vero*, *tiu regno kiu ne estas el ĉi tiu mondo*.

17. La bona tero por la nova kosma mondimpulso

Ni nun venas al la tria speco de estuloj, tiuj kies sento kaj inteligento sufiĉe bone ekvilibras, kaj kiuj sekve, ĉu en posedo de granda ĉu malgranda sento, ĉiam bidas ĝin per sufiĉe da prudento. Ĉar vera prudento aŭ inteligento kreas harmonion inter la manifestaĵoj de la individuo kaj la leĝoj de la universo, de la supraj eldiraĵoj do sekvas, ke ĉe tiaj individuoj ilia magneta altiro al la diversaj ĉirkaŭaj faktoroj en ilia ĉiutaga vivo restas en ekvilibro.

Fortigita aŭ troigita avido pri certa afero do ŝuldiĝas al malsufiĉeco de la prudento. La avido aŭ la sento akiras superregon, kaj la troigo manifestiĝas kaj rezultigas la malbonajn faktorojn, kiuj fariĝas la karakteraj ecoj de la du antaŭe priskribitaj kategorioj. Tiuj malbonaj faktoroj do ne troviĝas ĉe estulo, kies sento kaj prudento estas tiom evoluintaj kaj tiom en harmonio, ke la baza tono en la karaktero de la individuo fariĝas identa kun “*ĉioamo*”, kiu plue estas la kompleta ekvilibro aŭ nepartieco inter la individuo mem kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. *Kaj do estas tiu ekvilibro, sur kiu estas bazita la talento por kompreno*

kaj sekve por la akceptokapablo pri grandaj analizoj de la vivo.

Kiel montras la kvina ĉapitro de *“Livets Bog”*, ĉi tiuj kategorioj estas krome specifeblaj laŭ kategorioj kaj sekcioj, kaj tial ni ĉi tie limigas nin je la rimarko, ke same kiel la du kategorioj de malekvilibro la estuloj de la kategorio de ekvilibro kompreneble ne ĉiuj troviĝas same antaŭe en la evoluo, sed kontraŭe aperas laŭ gradoj. Kaj estas nur tiuj el ĝiaj estuloj, kiuj komencis forkreski de la malnova mondimpulso, kio alivorte signifas elkreski el la ĝeneralaj religiaj dogmoj kaj tekstoformoj, kiuj estas karakterizablaj kiel *“altintelektaj”* kaj sekve povas identigi sin kun *“la bona tero”* por la semo de *“la nova kosma mondimpulso”*.

18. La reago de la sentohomoj kaj inteligentohomoj al mia interpreto de la eternaj faktoj

Ĉiuj miaj prelegoj kiel ankaŭ mia verko *Livets Bog* kaj la revuo de la instituto *Kosmos* kaj krome mia simboliko estas semoj de tiu mondimpulso, estas informo pri la eternaj faktoj, kaj tiu tuta informado estas alirebla por ĉiuj, ĉar miaj prelegoj estas publikaj, mia literaturo estas aĉetebla por ĉiu, kaj do estas neevitebla afero, ke iom de tiu semo falas en ĉiujn tri specojn de tero: *la inteligenta kategorio, la senta kategorio kaj la ekvilibra kategorio.*

Ĉar *“la inteligentohomoj”* ja povas vibri nur en pure fizika spertomaterialo kaj sekve povas koncepti spiritan aŭ sentan spertomaterialon nur kiel fantaziaĵon, ili estas konsiderendaj preskaŭ kiel *“ŝtona grundo”* por la menciita semo. Ili estas *“materiistoj”* laŭ pura kulturo. Kaj *negativaj, ignoraj rimarkigoj pri mia interpreto de la grandaj problemoj estas tiuj esprimoj, per kiuj ili malkaŝas sian evoluŝtupon kaj sian neakceptokapablon por ĉia pli alta scio.*

Pro la reganteco de la vanteco anstataŭ de la prudento en sia konscio *“la sentohomoj”* travivas sian propran vivkoncepton kiel *“solan feliĉigan”* kaj krome vidas konkurencon en ĉia fremda koncepto, do *netoleremo kaj kontraŭeco estas tiu flanko de ilia naturo, kiun ili plej facile realigas kontraŭ mia interpreto de la grandaj faktoj.* Sed mi esperas, ke ĉiuj amikoj de mia informa laboro tra ĉi tio komprenis, ke tiuj estuloj estas senkulpaj, ĉar ilia agmaniero ja ŝuldiĝas al nematura konscistato, kaj sekve ili reale ne scias, kion ili faras, kaj ke tial *estus tute nenature ne renkonti tiujn estulojn kun kompreno kaj afableco.*

19. Tiuj estuloj, en kiuj “la bildo de Dio” videble elkreskas en ilia ĉiutaga konduto

Inter *“la estuloj de ekvilibro”* la plej elstaraj aŭ la plej altevoluintaj estas tiaj, *kiaj tute senestas ĉian avidon brili. Ili estas estuloj, kiuj estas kvietaj kaj komprenemaj rilate al ĉio kaj ĉiuj. Ili estas estuloj, kiuj facile silentas, kiam aliaj estas tro fervoraj montri sian scion. Ili estas estuloj, kiuj neniel deziras potencon kaj famon. Ili estas estuloj, kiuj preferere vivas nekonataj kaj nerimarkataj kaj aperas publike nur en tiaj okazoj, kie – ne vanteco, – sed devosento vokas ilin. Ili estas estuloj, kiuj absolute ne havas deziron superi unu la alian, sed evoluas sane kaj nature. Ili estas estuloj, kiuj altgrade komencas ami ĉion vivan kaj sekve laŭ responda grado sentas abomenon mortigi, vundi kaj korpodifekti. Tio validas ekstere rilate al iliaj videblaj kunestuloj, bestoj kaj homoj kiel ankaŭ interne rilate al “la mikroindividoj” en ĝiaj propraj organismoj. Kiel sekvo de tio ili facile fariĝas vegetaranoj, facile demetas eventualajn ruinigajn kutimojn, kiel ĝuadon de tabako, alkoholajn trinkaĵojn kaj aliajn*

narkotajn produktojn, kiuj ĉiuj efikas malsanige, korpodifekte kaj mortige al “la mikroindividuoj”.

Inter tiuj “estuloj de ekvilibro” do ekzistas granda talento por akceptokapablo rilate al la semo de la granda nova kosma mondimpulso. Por ili mia interpreto de la menciita impulso, miaj grandaj kosmaj analizoj aŭ plej alta scio de Dio, pri la viva estulo, pri la amo, estas precize tiu nutraĵo stimulantanta al la en ili loĝantaj bonaj ecoj aŭ ĝermoj de perfekteco. La menciitaj estuloj sekve akceptas la novan saĝon kun humileco, dankemo kaj amo. Ili aŭdas, vidas kaj konservas la vorton en siaj koroj. Kaj “la bildo de Dio” kviete elkreskas en ilia ĉiutaga manifestado kaj konduto.

20. Kiam oni malesperiĝas pro amikoj, kiuj ne estas interesitaj pri spirita scienco

Nature amikoj de mia laboro havas la deziron, ke en ilia konataro kiel eble plej multaj partoprenu tiun semon, tiun scion kiu estas alirebla ĝuste tra mia laboro. En ilia amo al la afero ili sekve klopodas igi aliajn studi ĝian literaturon kaj aŭskulti prelegojn. Sed ja kelkfoje okazas, ke amikoj aŭ konatoj, kiujn ili venigis, pli aŭ malpli reprezentas la du menciitajn formojn de malpli bona tero. Tiam tiuj estuloj prezentas kritikon, kiu kelkfoje povas proksimiĝi al indigno aŭ kontraŭeco al la afero. Feliĉe tio ne okazas tre ofte, sed la koncernaj amikoj de la afero, kiuj sopiris pri feliĉa rezulto de siaj penoj, kompreneble malesperiĝas kaj komencas pripensi, ĉu eble mia informa laboro tamen estas tro malfacila por la plej multaj, kaj ke sekve fariĝos tro malmultaj tiuj, kiuj povas akcepti la novan semon. Kaj interalie ankaŭ pro tio mi sentis min instigita elsendi ĉi tiun libron kaj malkaŝi la realajn cirkonstancojn.

21. La maniero, laŭ kiu la homoj, kiuj havas la spiritan sciencan kiel vivobazon, devas rilati al aliaj estuloj

Kiel tiuj miaj amikoj nun vidis, troviĝas la tri menciitaj specoj de tero por semado, el kiu nur la tria vere estas taŭga. De la du aliaj plejparte venas nur malica kritiko kaj kontraŭeco. Sekve estas grave evoluigi en si la distingokapablon tiel, ke oni ne venu en situacion influi al la eraraj estuloj. Ili ja havas sian vivkoncepton, sian vojon al la lumo. Kaj estas nur perforto, se oni miksas sin en ĝin. La akceptokapablaj nepre venos iom post iom. “*Ne estas la mielo, kiu iras al la abeloj, sed la abeloj, kiuj venas al la mielo*”.

Krome la studentoj de mia laboro devas ankaŭ gardi, ke ne same kiel la antaŭe menciitaj individuoj ili venu en situacion esti gvidataj de vanteco. Vanteco povas nome ankoraŭ troviĝi ĉe unuopaj el tiuj interesitoj, kiuj ankoraŭ troviĝas en la limregionoj inter la kategorio de malekvilibro kaj la kategorio de ekvilibro kaj interalie esprimiĝi en pli granda avido pri multaj adeptoj ol pri alta kvalito ĉe tiuj, kio ja estas la malo de tio, kion la prudento rezultigas, nome pli granda avido pri alta kvalito ol pri multaj adeptoj. Unu milo da individuoj kun la vera centprocenta akceptokapablo ja estas multe pli granda avantaĝo kaj forto por la afero ol dek miloj da individuoj kun nur dek aŭ dudek procentoj de akceptokapablo. La restantaj naŭdek aŭ okdek procentoj prezentas nur kontraŭon kaj ekstere estus malĝusta kaj domaĝa reprezento de la afero. Tial la kvalito estas la ĉefa kondiĉo, la nombro estas duaranga. Kun la neskuebleco de la kvalito la laboro ja ankaŭ kreskas neskueble, kion la faktoj en la kadroj de mia laboro ja altgrade esprimas.

22. Kiam mi uzas la esprimon:

“Mi kaj la Patro ni estas unu”

Ĉar miaj prelegoj estas publikaj, ne estas eviteble, ke al tiuj venas ankaŭ homoj, kiuj ne anticipu havas konon pri mia laboro. Al tiuj homoj la prelegoj kompreneble iagrade povas efiki kiel nenaturaj kaj eble ankaŭ kiel fanfaronoj, kaj eble eĉ al homoj, kiuj alie estus konsiderataj kiel akceptokapablaj. Tio, kio kontraŭas al la koncepto de tiaj homoj, estas precipe tio, ke pro la vero ni bezonas informi, ke “*mi kaj la Patro estas unu*”, kaj ke mia informa laboro ŝuldiĝas al “*superombrado de la sankta spirito*”. Tia deklaro kompreneble povas impresi kiel orgojlo, kiel blasfemo. Kaj tiu koncepto povas plue, laŭ la temperamento de la koncernaj aŭskultantoj impresi tiel al ilia cetere akceptokapabla sinteno, ke ĝi subfosigiĝas kaj rezultigas iom da indigno.

Sed tiurilate mi devas nur referenci al tiu instrukcio, kiun donis la granda instruisto kaj origino mem de la kristanismo, nome al tiu, ke “*per iliaj fruktoj vi konos ilin*” kaj cetere memorante la nocion “*ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj, ĉar per kia juĝo vi juĝos, per tia vi estos juĝataj*”.

23. La fonto de kiu mi havas mian scion

Kiam vera verkisto prezentas verkon aŭ prelegisto prelegon, ili kutime informas pri la fontoj, de kiuj ili havas sian scion. Kiam mi devas fari prelegon, ankaŭ mi sentas dece informi al miaj aŭskultantoj pri la fontoj, el kiuj mi havas mian scion. *Mian scion mi ne havas de aliaj personoj, de la ekzistanta literaturo aŭ de iu informo de akademia edukiteco, kiel cetere kutime validas por instruistoj, sed kontraŭe mi mem estas origino de mia tuta scio, ĉar mi havas travivadkapablon, kiu ankoraŭ ne estas ĝenerala, sed tio ja ne devigas min teni tiun scion sekreta kaj per tio*

kaŝi la veran fonton de mia scio. Kaj precipe ne, ĉar la menciita fonto estas plenumo de promeso, je kiu ĉiu vera kristano mem devas fidi, ĉar ĝi estas eldirita de la plej alta aŭtoritatulo de la koncerna religio kaj temas pri tio, ke ĉiuj devas atingi klarecon pri la mistero de la vivo. Tiu promeso sonas inter alie jene:

“Sed la parakleto, la sankta spirito, kiun la Patro sendas en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi”. –

“Kaj kiam li alvenos, li pruvos la mondon kulpa rilate pekoni kaj justecon kaj juĝon”. –

“Tamen kiam venos li, la spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron”. –

24. Mia kosma travivado aŭ la travivado de „la sankta spirito”

Kion diras tiu promeso, kaj kiel ĝi rilatas al mia literaturo kaj miaj prelegoj? –

Ĝusta kompreno pri tiu promeso estas mezurilo por mezuro de mia laboro kiel identa kun la ĝustaj “*fruktoj*”.

Kristo, kiu ne havis sian scion de aliaj personoj aŭ de iuj ajn literaturaj aranĝoj, ja spertis, ke scion oni povas travivi laŭ tute alia maniero ol la pure materia tera formo. Kaj ke tiu scio ĉiam estas ekskluzive nobla, absolute vera kaj amema scio, tio inspiris lin esprimi ĝin kiel “*sanktan spiriton*”.

Ĉar spirito estas la samo kiel konscio, “*sankta spirito*” sekve estas la samo kiel “*sankta konscio*”. La disĉiploj estis konfuzitaj pri tiu stato de konscio kaj la de el ĝi elradianta scio, ĉar ili ne mem posedis ĝin, sed tio estas ja nur tio, kio ripetigis en nia tempo, kiam miloj da homoj tute ne havas scion pri la reala kaj vera naturo de tiu konscio. Sed Jesuo ja anoncis, ke ili ĉiuj ricevos ĝin, kaj ke ĝi instruos ilin pri ĉiuj aferoj. Kaj tra la instruo mem de la kristana religio ni ja scias, ke pentekostan tagon la menciita spirito

superombris la disĉiplojn, kaj ili parolis “*fremdajn lingvojn*”, kio kompreneble malpli signifas rekte fremdajn lingvojn ol fremdan aŭ novan saĝon. Samtempe estas dirite, ke la okazaĵo komenciĝis per lumfenomenoj en formo de “*lingoj kvazaŭ el fajro*”, kiuj lumis super la kapoj de la apostoloj.

Sed tra tiuj lumfenomenoj ni ricevas ian signon, kiu indikas, ke ĉe pluraj aliaj okazoj en tiuj foraj tempoj la menciita spirito superombris aliajn estulojn. Ni povas reiri al Moseo, kiu paŝtis ŝafojn en la dezerto. Kiu estus tiu dorna arbeto, kiu brulis? – Kaj kiu estis tiu voĉo, kiu petis lin depreni siajn ŝuojn, ĉar la loko, sur kiu li staris, estas sankta? – Nek la voĉo nek la fajro estas el fizika, sed el superfizika naturo. Moseo do ricevis la kapablon korespondi kun superfizikaj realaĵoj kaj ricevis novan konscion, pro kio li ŝanĝiĝis al granda gvidanto por la popolo de Israelo.

Io simila ja validis por Paŭlo, kiam li envualiĝis en *blankan lumon* sur la vojo al Damasko. Ĉu ne ankaŭ lia konscio ŝanĝiĝis? Ĉu ne lia “*lingvo*” ŝanĝiĝis de la stato de la kontraŭulo al tiu de probatalanto?

Sed se tiaj aferoj povis okazi antaŭe kial ili do ne povu okazi denove? –

Kiam en la aĝo de tridek jaroj mi plurfoje envoviĝis en fortan spiritan aŭ superfizikan lumon, travivis diversajn variaĵojn de fajrobapto, kaj tio sekvigis, ke ankaŭ mi “parolis fremdajn lingvojn”, kio signifas parolis surbaze de nova scio, novaj cirkonstancoj, kiujn mi ne povis apliki antaŭe, ĉu do ne estas la sama dia fenomeno, kiel tiu, kiun travivis la personoj de la Biblio? –

Miaj paroloj, teksto kaj bildoj pravas por tiu, kiu havas sufiĉan bazon por tio, ke la ĉi tie dirita estas vero, kiu cetere ankaŭ estas pruvebla de miaj proksimaj ĉirkaŭantoj, kiuj konis min dum la jaroj, kaj tial mi sentas min ne nur

rajtigita, sed ankaŭ devigata informi ĝuste pri la identeco de mia propra travivadkapablo kun *la sankta spirito*, aŭ de la plenumo de tio, kio estas promesita okazi al ĉiu individuo, kiam la tempo estas. Mi estus ja perfidulo al la realaj faktoj, se mi kaŝus tiun mian staton, nur ĉar pro sia nescio kaj naiveco kelkaj homoj konceptus min kiel blasfemanton, kaj precipe, ĉar mi scias precize, ke tiaj estuloj estas etaj kompare kun tiu granda scio kaj sekve ne vere scias, kion ili faras.

25. La garantio por la identeco de miaj kosmaj analizoj kun la eterna vero

*Ke ĝuste pro la sankta spirito kreiĝas mia informa laboro, estas rekoneble per tio, ke sur neniu kampo miaj analizoj havas alian rezulton ol la amo. Ĉie ĝi estas unu granda defendo por la plenumo de la granda ordono “*amu unu la alian*”. Estas ne malpli ol matematika klarigo pri la senmorteco kaj pri tio, ke “*kion homo semas, tion ankaŭ li rikoltos*”. Estas videbligo en la fizika sfero de eterne klariĝinta estado, transformita malsupren kaj alirebligita por teraj okuloj kaj oreloj.*

Mi mem estas viva pruvo pri tio, ke oni povas akiri scion laŭ aliaj vojoj kaj fontoj ol la ĝis nun aprobitaj kaj konceptitaj de la teraj homoj, samtempe kun tio, ke tra mia laboro mi estas metita por publika vidado de ĉiu, kiu havas emon kaj kapablon vidi, aŭdi kaj observi.

Ĉia koncepto, kiu esprimas min kiel “blasfemanto”, kiel “trompanto”, kiel “orgojla” kaj tro “memkontenta” ktp. sekve ne havas radikon en la realo, sed estas bazita nur sur nescio, vanteco kaj netoleremo.

Kontraŭlabori min signifas kontraŭlabori la veron. Kontraŭlabori la veron estas kritiki la sunon, tio estas spiti al la irado de la steloj.

Kiel kroma garantio por la identeco de mia laboro kun la vero estas direble ke por tiuj, kiuj havas emon kaj kapablon studi ĝin ĝi fariĝas matematika klarigo de konformeco de ĉiu sfero kun la dia ĉioampleksa mondplano kiel elvoka faktoro por neskiebla inteligenteca amkreanta celo, kio plue por la evoluinta spirita esploranto estas kulmino de la plej alta garantio, sur kiu eblas bazi la identecon de mondkoncepto kun la vero aŭ la realo, kaj ke ĉiu ajn mondkoncepto, kiu devias de tio, pruveble estas pli aŭ malpli granda falsaĵo.

26. Kial mia vizio povas esti kaj fariĝi nur lumo

Por tiuj, kiuj ne laŭ ĉi tiu maniero povas esplori mian laboron kaj sekve ne povas atingi la menciitan garantion, mi proponas, ke ili rimarku, ĉu en iu maniero mi stimulis la mallumon, ĉu miaj grandaj kosmaj analizoj ne ĉiam nepartiece

montras nur la kaŭzojn de sufero kaj la kaŭzojn de feliĉo. – Esploru, ĉu ne tiuj fontoj konformas al la kerno de tio, kio estas skribita en la Biblio kaj aliaj grandaj religiaj verkoj, kaj ĉi tie vi trovos mirinde belan konformecon laŭ la principoj de tiuj verkoj. Kun tio ke krome estas tiel, ke mi ne deziras enfermi iun individuon en iun ajn de mi aŭ sur mia laboro bazitan sekton, unuiĝon aŭ kredokonfeson, ke mi batalas por tio, ke la individuo povas konservi sian plenan liberecon por esplori, serĉi kaj trovi lumon sur ĉiuj kampoj kaj regionoj, kie lumo estas trovebla kaj pere de tio lerni pensi klare, travivi klare, do mia laboro, mia misio estas nur lumo, povas esti nur lumo kaj fariĝas nur lumo.

Tradukita el la dana originalo de 1934 “Omkring min fortolkning af livets store analyser” de Ib Schleicher en la sepdekaj jaroj, redaktita de Ole Therkelsen en 2012.



Martinus 8

La nova mondimpulso

de Erik Gerner Larsson



Dum la efikoj de tiu mondimpulso, kiu estas bazo por la tri grandaj mondreligioj hodiaŭ senvualigis por la sufiĉe evoluita esplorado, tio ne estas la kazo rilate al la nova mondimpulso. Ĉi tiu impulso estas ankoraŭ naskiĝonta, sed ĝiaj vibradoj jam estas tiel fortaj, ke eĉ la plej multaj homoj en si sentas, ke nova tempo alproksimiĝas. Ĉar la plej ekstremaj efikoj de ĉi tiu impulso kondiĉigas, ke la tuta sur la tero vivanta homaro sub ĝia influo kunfandiĝos al kaj fizika kaj spirita unueco, tial jam nun estus eble montri la unuajn efikojn en ĉi tiu direkto, kaj tio ja ankaŭ okazas.

Ĉien, kien ni turnas nin, ni atestas, ke ĉiuj ĝisnunaj perceptoj estas denove reviziataj. Se oni ekzemple elektos la religian vivon, ni ĉi tie atestas, ke ĉie ĝi troviĝas en kriza periodo, kie pretendo staras kontraŭ pretendo, kaj tiamaniere ankaŭ la maturiĝanta junularo demonstras sian propran malfortecon kaj mankon de logiko. Ĉi tiu batalo, kiu en sia plej profunda analizo nur esprimas la mort-batalon de la antikviĝintaj dogmoj, ĉie postlasas siajn signojn sub formo de senhomiĝo de la temploj kaj preĝejoj de l'antaŭa religia kulto sen ia rilato al la malkreskanta religia sento pro la senhomiĝo. Ke ni en la kadroj de pentro-arto, muziko, arkitekturo k. c. vidas la saman lukton

nur plie konstatas, ke novaj kaj senlime potencaj kread-fortoj estas aperantaj.

Plej forte estas tamen la lukto en la ekonomia kaj socia vivo. Ĉi tie la nova mondimpulso kaŭzis koncentrigon de la fortoj, kiuj necese estis kondukan-taj al la terura finbatalo, kiun ni ĝuste en nia tempo travivas. Senskrupula potenco-avido, kies radikojn oni povas trovi profunde en la substadia besta regno, batalas ĉi tie lastan kaj en si mem mortportantan batalon kontraŭ la tra la nova mondimpulso stimilitaj sopiroj pri senmilita, humaneca kaj justecplena administracio de ĉiuj fizikaj kaj spirita-j valoraĵoj. La venenigaj flamoj de la netoleremo penadas por la lasta fojo disrompi la vivdonantajn principojn de la toleremo kaj amo al la proksimulo. Ke la rezultato de ĉi tiu giganta batalo fariĝos la fina venko de la lumo jam delonge fariĝis fakto por tiu, kiu dank' al la kosmaj analizoj de Martinus ekvidis la mondplanon. Ĉi tiu venko, kiu plenumigos la pratempajn profetaĵojn de la Biblio pri "la tago de juĝo" estas la unua evidenta efiko de la enpenetrado de la nova mondimpulso en la pensosferon de la surtera homaro, pro kio ĉi tiu katastrofo, kiu nun komencas superondigi la homojn, ankaŭ plej bone estas esprimata kiel la neeviteblajn *naskiĝ-veojn de la vera homara regno*.

Traduko Margrethe Noll en 1939

L.L. Zamenhof kaj Palestino

de Johan'-Luko Tortel



En 1881, ses jarojn antaŭ la apero de Esperanto, oni murdas caron Aleksandro II, kaj tuj ekaperas la multkapa monstro: pogromaro en la tuta Imperio, interalie en Bjalistoko kaj Varsovio. Sekve Zamenhof komence de 1882 ruse verkas por la juda Peterburga kulturgazeto *Razsvet* (*Tagiĝo*) unuan artikolon, tipe Zamenhofeskan pro sia ekvilibro inter rigora racieco kaj kortuŝa emocio: "Kion do finfine fari?" Zamenhof dividas sian tekston en kvin partojn. En la unua li klarigas la sopiron de la juda popolo al propra patrujo, kie ĝi ne plu estus "ŝutata de insultoj kaj malbenoj" (citaĵoj tradukitaj el la rusa originalo), kie ĝi ne plu bezonus manĝi "viandon en Egiptaj potoj" (Biblia aludo al La Eliro). Nepre necesas ŝanĝo de la situacio post la apero de la "plumba nubo de malfeliĉo".

La dua parto celas demonstri, ke asimiliĝo de judoj, t.e. kunfandiĝo kun aliaj popoloj, tute ne eblas "malgraŭ la opinio de kelkaj judoj". Tri interesaj Zamenhofaj konsideroj aperas en tiu parto. Unue lia granda ideo, ke du elementoj faras popolon: komuna lingvo, komuna religio. Li due rimarkigas, ke en antikva tempo romianoj, pro sia multedia religio, estis pli toleremaj ol la nunaj homoj, ĉar ili estis pretaj aldoni aliajn diojn al siaj propraj.

Li trie klarigas la civitanleĝajn konceptojn tiam en uzo en la Rusa Imperio. Ili estis tute fremdaj de tiuj de Homaj Rajtoj starigitaj de la Franca Revolucio, laŭ kiuj ĉiuj homoj estas leĝe egalaj.

Laŭ tiu ĉi lasta konceptaro, religio kaj genta deveno tute ne influas sur la civitana rajtaro. Di-kredo, politika opinio, sindikata aparteno, landa deveno estas simple privataj aferoj. Se Zamenhof estus akceptinta la proponon de Javal veni vivi en Francujon li estus post tempo akirinta la francan naciecon, kun la plenaj rajtoj de franco, kies religio kaj origino estas leĝe indiferentaj. Sed en la Rusa Imperio, kie li vivis, li povis diri: "ni povas esti nur civitanoj de Rusujo [...] sed ne rusoj [...]". Judeco aŭtomate tiam pelis judojn en malsupran nivelon, ekster la resto de l' enloĝantoj. Ekzemple unu filo de Freud, mobilizita en la aŭstra armeo en 1914, ŝerce skribis al sia patro, ke li tiel havos la okazon " [...] eniri Rusujon sen ŝanĝi religion" tiel aludante la neeblojn por fremda judo eniri tiun landon.

En la parto tria de sia teksto, Zamenhof konsideras la solan saveblon: elmigri. Sed kien?



Domo de Zamenhof, Dzika strato 9, Varsovio

Ĉu Ameriko aŭ Palestino?

Tiam ekzistis du partioj en la Judaro: la al-Amerika, kaj la al-Palestina. Zamenhof klare elektas la unuan, apogante sin sur estontaj politika kaj ekonomia situacioj multe pli facilaj en Ameriko. Male ĉu la antikva Hebrea loĝado en Palestino pravigus nunan revenon tien? Ĉu “[...] Jankioj sentas nepron reveni Anglujon? Vi trovas tre komike, se Eŭropaj popoloj nomus sin malfeliĉaj, ĉar ili nun ne vivas tie, kie antaŭ kelkaj jarmiloj vivis iliaj prauloj [...]” “Palestinanoj” (en lia tiama diro tio kompreneble signifas: al-Palestinemuloj) estas “ekzaltiĝemaj [...]”.

En sia parto kvara, Zamenhof asertas, ke Palestina aliro kreos amason da religiaj kaj sociaj problemoj. En parto kvina, la lasta, li insistas, ke Amerika “elmigrada fonduso post rapida kreskado [...] povos peti proklami sian teritorion ŝtato kaj enkorpiĝi en Nordamerikan Konfederacion”.

Li konkludas, ke la bona solvo estas elmigri al Ameriko, kaj li finas per la alvoko: “Ĝis revido [...] sur liberaj bordoj de Misisipo!”

Refari historion ne havas sencon; tamen ĉiu rajtas reve imagi la nunan mondon kun la nunaj Hebreoj trankvilaj sur la bordoj de Misisipo, kiel Mormonoj en Utaho... Sed subite, apenaŭ unu-du monatojn poste, en Marto, jen Zamenhof komplete ŝanĝas sian opinion: li en dua artikolo samgazeta elektas Palestinon! “Hejmen! En malnovan patrujon! [...] Ni devas cedi [...] al movo Palestinon.”

Apenaŭ kredebla komplete renverso en kelkaj semajnoj! Ĉu Zamenhof estis ventoflago?

Ha! Lia tuta batalo por Esperanto, lia ĝentila sed firma lukto kontraŭ la reformemaj eminentuloj, lia nefleksebla rezisto kontraŭ la monotrezoro proponata de Javal male pravas nedetrueblan persistemon sub plej diplomata konduto.



Zamenhof, 19 jara studento, 1878

Do pro kia mistero Zamenhof, post konvinka pledo favore al “Ameriko”, tiel facilanime cedas al “Palestino”?

Ni vane serĉus argumentojn en lia dua artikolo. Li eĉ pludiras: “[...] malfacilaĵojn [...] vere pli multe [...] estas en Palestino, ol en Ameriko”. Kio do klarigas lian tujan rezignon? Ĉu li prezentas novajn kialojn favorajn al “Palestino”? Neniajn. Kial do lia komplete turniĝo?

Mallonga estas la respondo: lia koro. Racia estis la elekto “Amerika”, sed elkora la elekto “Palestina”. Kiel rezisti al “Palestino”, kiam oni apartenas al asocio, kies nomo estas Ĥibat-Cion, kio signifas “Amo al Palestino”? Kiel rezisti kiam oni jud-tradicie ripetas: “Venontan jaron en Jeruzalemo?” En tiu dua artikolo abundas historiaj kaj Bibliaj aludoj: “Egiptaj potoj” (nova aludo al La Eliro); “lakto kaj mielo” (aludo al Kanaano); “malnova patrujo; historia patrujo; malnova popola idealo; malnova standardo de Izraelo; malnova cindrejo; aspiro al Palestino [...]”.

La rezonado ne plu validas; ekzemple la “malfekundeco de Palestino” estas de li konsiderata senvalora! Li ne hezitas aserti, ke la “tempo de rezonado pasis!” ke “estus peko defendi siajn personajn opiniojn [...]”.

Neniu nun aŭdacus riproĉi al li la venkon de lia koro super lia cerbo en la tiama situacio. Tamen tia cedo lia okazis por la unua sed lasta fojo. Neniam plu rompiĝos lia rimarkinda ekvilibro inter sentemo kaj racieco. Nur por eviti rektan malutilon al Esperanto li tre malfacile kaj por mallonga tempo konsentos ne deklami en Bulonjo tiun faman parton de la poemo

Preĝo sub la verda standardo:

Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj

Ni ĉiuj de Di' estas filoj

De la cionismo al la homaranismo

Malgraŭ sia daŭra “simpatio” al la ideo de cionismo, li rifuzos submetiĝi sub la “komuna standardo” de la cionista movado de Herzl de 1897. Li pensos, ke li

jam definitive superpasis tiun nivelon kaj atingis pli altan sferon, la alvenon de tutmonda popolo. Malgraŭ la oro de Javal li malakceptos cedi al gravaj ŝanĝoj pri Esperanto. Certe tre kruele por si, li tiel rifuzos landan kaj monan sekurecojn ankaŭ al sia familio. Poste, malgraŭ la ĝenerala malŝato al Homaranismo konsiderata utopio, li neniam rezignos pri ĝi, juĝante ĝin nemalhavebla ĝemelo de Esperanto. Ni vidis ke, laŭ li, popolon vivigas lingvo kaj religio: do al nova tutmonda supernacia popolo necese apartenu nova tutmonda lingvo kaj nova tutmonda religikoncepto.

Fine tiu miriga opiniŝanĝo en du sinsekvaj junaĝaj artikoloj Zamenhofaj pruvas ne lian facilanimecon, ne lian senpripensecon, sed male la jam aperantan en li pli altnivelan celon: la deziron krei unuiĝintan homaron, antaŭ kiu devas duarangi eĉ la judpopola problemo kara al li.

Kun permeso redonita de UEA-revuo *Esperanto* n-ro 10, 2009



Klara kaj Ludoviko geedziĝis en la jaro 1887, kiam Unua Libro eldoniĝis



Unua libro, 125 jara jubileo

de Árpád Rátkai

Rusa judo, la kuracisto Lazar Markoviĉ Zamenhof (1859-1917) verkis kaj eldonis la projekton Lingvo Internacia en 1887. Ĝi aperis en la urbo Varsovio, en kvar lingvoj, en apartaj broŝuroj, sub la plum-nomo Dr. Esperanto. La ruslingva varianto eliris la unua la 26-an de julio, kaj baldaŭ sekvis ĝin la pola, franca kaj germana eldonoj kun la titolo Lingvo Internacia en la respektivaj lingvoj. Tiujn kvar, esence identajn broŝurojn kune oni nomas tradicie Unua Libro. La plumnomo de la aŭtoro poste transiris al la lingvo mem, tiel Esperanto iĝis sinonimo de Lingvo Internacia. En la sekva jaro aperis la Dua libro de l' lingvo internacia sub la plumnomo D-ro Esperanto. Fakte ĝi estis la unua libro en Lingvo Internacia, ja la kvar supre menciitaj estis ne en sed nur pri la lingvoprojekto, kvankam kun kelkaj teksto-modeloj.

La uzantojn de la lingvo oni komencis nomi esperantistoj. La unuaj esperantistoj vivis diaspore en pluraj landoj, kaj komuniĝis inter si per leteroj. Laŭ Waringhien "oni povas diri, ke same kiel kristanismo elkreskis el la grek-lingvaj sinagogoj, tiel Esperanto enplantiĝis en la volapukistajn rondojn, kaj tie ekfloris." La afero tamen ne evoluis glate. Akra kaj disdivida diskuto disvolviĝis pri ŝanĝoj kaj modifoj en la lingvo.

Forumo de la diskutoj estis la unuaj Esperanto-revuoj. Nurenberga Mondo-lingvo-Asocio ŝanĝis sian subtenon de Volapuko al Esperanto, kaj eldonis la revuon La Esperantisto (1889-1995) ĝis

la elĉerpiĝo de la forto de mecenatoj. Poste en la sveda urbo Uppsala aperis Lingvo Internacia (1895-1899), sed ankaŭ ĝi havis la saman sorton, kaj devis anonci sian ĉeson. Tamen en la lasta momento la presisto Pál Lengyel prenis sur sin la eldonan taskon, kaj la revuo en la jaroj 1900-1904 aperis en la hungara urbo Szekszárd.

Lingvo Internacia iĝis ne la sola, sed "nur" la ĉefa organo de kreskanta movado. Krom la revuoj pli kaj pli ofte aperis ankaŭ libroj pri kaj en Esperanto. Ekĝermis Esperanta literaturo tradukita, eĉ originala. La lingvo komence ekzistis preskaŭ ekskluzive en skriba formo, sed la esperantistoj pli kaj pli ofte renkontiĝis, kaj apud la skriba lingvo disvastiĝis ankaŭ la buŝa.

La movado disvastiĝis ankaŭ geografie. En pli kaj pli da urboj formiĝis esperantistaj kluboj, grupoj. Fondiĝis landaj esperantistaj organizaĵoj: unue la franca (1898), kaj en la jaroj 1902-1905 unu post alia svisa, itala, hungara, hispana, brita, meksika, dana, brita, belga, nederlanda kaj usona landaj asocioj.



Unua Libro, 26-an julio 1887

de Aleksander Korĵenkov



La 14an de julio 1887 (la 26an de julio, laŭ la Gregoria kalendaro) en la presejo de Ĥaim Kelter (Varsovio) aperis 42-paĝa broŝuro *Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro (por Rusoj)*. Ĝia aŭtoro, la 27-jara Ruslanda judo Lazarj Markoviĉ Zamenhof, kaŝis sin sub la pseŭdonimo “D-ro Esperanto”. Ĝis la jarfino aperis pola, franca kaj germana eldonoj de la verketo, kiu poste ricevis la “popolan” titolon: la *Unua Libro*. Sekvis eldonoj en pluraj aliaj lingvoj.

La titolpaĝo de la *Unua Libro* estis surprize simila al tiu de *Volapük: Die Weltsprache* de Johann Martin Schleyer. Reinhard Haupenthal notis, ke “la granda simileco prave supozigas, ke Zamenhof intence imitis la pli fruan verkon de Schleyer” kaj listigis similaĵojn en la du germanaj eldonoj [Haupenthal R. *La Unuaj Libroj de Schleyer (1880) kaj de Zamenhof (1887): Pri la lanĉo de du plan-lingvoj*. Schliengen: Edition Iltis, 2000]. Sed la libroj mem estis malsamaj. La 150-paĝa Volapüka estis preskaŭ kvaroble pli ampleksa, ĉefe, pro la pli ol 80-paĝa vortaro. Schleyer alparolis la mondon propranome, sed Zamenhof uzis pseŭdonimon, ĉu por eviti misfamigon inter la klientoj, ĉu por ke la disvastigon de la libro kaj de la lingvo ne ĝenu la judeco de la aŭtoro, ĉu pro natura modesteco.

La *Unua Libro* konsistas el kvar partoj, inter kiuj la plej ampleksa estas ne la *Plena lernolibro*, sed la *Antaŭparolo* (p. 3–30).

Unue, Zamenhof mencias la problemojn kiujn la diverslingveco kaŭzas en ĉiuj sferoj de la vivo, kaj atentigas, ke ĝi kaŭzas ankaŭ malamikecon inter la popoloj. Same kiel multaj lingvoprojektantoj, li kredis ke lingvo internacia havus grandan praktikan signifon por scienco kaj komerco, sed li emfazis, ke grandegan utilon alportus al la homaro lingvo internacia, kiu, *ne entrudiĝante en la doman vivon de la popoloj*, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa.

Efektive, Zamenhof volis solvi ne nur la lingvan problemon, kaj post pluraj jaroj li konfesis: mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo — al la revo pri la unuiĝo de la homaro. Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo.

Sed en la *Unua Libro* Zamenhof ne longe haltis ĉe tiu ideo kaj traktis, ĉefe, lingvajn aferojn. Prezente la historion de la lingvoprojektado, li konstatis, ke por lingvigi projekton oni devas solvi tri taskojn, kaj ke en neniu antaŭa projekto estis solvita pli ol unu tasko, sed li sukcesis solvi ĉiujn tri.

- 1) La lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante. — Tion li solvis per simpligo de la gramatiko, kiun “oni povas bonege ellerni en la daŭro de unu horo”, kaj per regula vortfarado helpe de prefiksoj kaj sufiksoj.
- 2) La lingvo jam de la komenco mem kaj dank’ al sia propra konstruo

povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikiĝoj. — Por tio li “aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj”. Li donis ekzemplon de tio, ke alilandano ne konanta la rusan lingvon kaj ruslandano ne konanta la lingvon de la alilandano, povas interkompreniĝi, eĉ ne konante la lingvon internacian, nur helpe de vortaroj.

Doninte ses tekstojn en sia lingvo — *Patro nia; El la Biblio; Letero; Mia penso* kaj *Ho, mia kor’* (du poemoj de Zamenhof); *En sonĝo princinon mi vidis...* (poemo de H. Heine tradukita de Zamenhof) — li klarigis la trian taskon:

3) Venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivan, ne en okazo de ekstrema bezono.

— Kosciante, ke oni ne lernas lingvon, kiun neniu uzas, li proponis tutmondan kampanjon, por ke oni promesu ellerni la internacian lingvon, “se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tiun saman promeson”.

Promes,o.

Mi, subskrib,it,a, promes,as el,lern,i la propon,it,a,n de d-r,o Esperanto lingv,o,n internaci,a,n, se estos montr,it,a, ke dek milion,o,j person,o,j don,is publik,e tia,n sam,a,n promes,o,n.

Sub,skrib,o:


Zamenhof anoncis, ke la adresaro de la dek milionoj da promesintoj (voĉdonintoj) aperos en aparta libro (cent milpaĝaj adresaregoj kun cent adresoj ĉiupaĝe), kaj avertis:

Poste ne estos pravigitaj antaŭ la socio la personoj, kies nomoj ne estos en la voĉdonlibro, nek en la fako de la promesintoj, nek en la fako de la kontraŭintoj. Neniu esperu pravigi sin per tio, ke li “ne aŭdis” pri la proponita voĉdonado, ĉar estos uzitaj ĉiuj rimedoj por ke ĉiu sciu pri la voĉdonado.

Krom la antaŭparolo en la libro estas:

- ok eltranĉendaj slipoj (du folioj) kun promesdeklaro (p. 31–34);
- plena lernolibro de lingvo internacia sur ses paĝoj: alfabeto, partoj de parolo (ok reguloj), ĝeneralaj reguloj (ok reguloj) — entute 16 reguloj (p. 35–40);
- permeso traduki la broŝuron al ĉiuj ceteraj lingvoj (p. 41) kaj la adreso de la aŭtoro (p. 42);
- vortaro internacia-nacia (en la rusa 917 vortoj en 894 “artikoloj”) sur du flankoj de granda folio.

Sur la dua paĝo estas jena ruslingva deklaro:

 **Интернациональный языкъ, подобно всякому национальному, составляетъ достойное общественное, и отъ всякихъ личныхъ правъ на него авторъ на всегда отказывается.**

(Lingvo internacia, simile al ĉiu nacia, estas socia propraĵo, kaj la aŭtoro por ĉiam forlasas ĉiujn personajn rajtojn al ĝi.)

Zamenhof petis sendi kritikon pri la projekto kaj promesis utiligi la plej bonajn proponojn en speciala broŝuro, kiu fiksis la definitivan lingvoformon. Post eldono de la broŝuro la novan lingvon rajtos ŝanĝi ne li, sed nur kompetenta akademio, kiu “povos laŭgrade kaj nerimarkate fari ĉiajn necesajn plibonigojn, eĉ se ĝi estos devigita poste ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonobleco”.

Zamenhof dissendis la *Unuan Libron* al diverslandaj redakcioj, societoj, kleruloj. Kvankam li aperigis en gazetaro (precipe en Ruslando) plurajn anoncojn, li ne ricevis dek milionojn da promesoj. Tamen al li venis centoj da leteroj (pozitivaj, negativaj kaj ŝercaj), kaj eltranĉitaj slipoj kun deziresprimo lerni la novan lingvon sendepende de la nombro da ricevitaj “promesoj”. La projekto eklingiĝis, kaj la pseŭdonimo de la aŭtoro iom-post-iom iĝis ĝia nomo — Esperanto.

Kvankam Zamenhof skribis en la *Unua Libro*, ke li dum unu jaro eldonos nenion en la nova lingvo, li jam en januaro 1888 publikigis ĉe Kelter *Duan Libron de l' lingvo Internacia*. *Kajero №1* por resumi kaj respondi la ricevitajn leterojn.

Kun permeso redonita de La Ondo de Esperanto, 2008, n-ro 2, kaj Dek Libroj, Sezonoj, Kalingrado, 2010.



Unua komitato en 1888. Kabe, Brzestowski, Belmont, Grabowski, Zamenhof, Zakrzewski

INFORMO PRI LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjølland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Institucion. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto

Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 38 34 62 80

fakso (+45) 38 34 61 80

Telefontempo:

lundo-ĵaŭdo 13-16

vendredo: 9-12

DK p.ĝiro 642-9580

UEA-kodo mins-d

www.martinus.dk

esperanto@martinus.dk

shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca),

Helen Claesson kaj Jonas Dalmose.

Kompostado: Dan Elhaŭge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj

Prezo en EU: DKK 75,00 aŭ EUR 10,00

Prezo ekster EU: DKK 60,00 EUR 8,00

aŭ USD 12,00

Unuopa kajero: DKK 40,00

Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Institut

Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

Presita de Martinus Institut

ISSN 1600 41 16.

Д-р ЭСПЕРАНТО.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ
ЯЗЫКЪ.

ПРЕДИСЛОВИЕ

=

ПОЛНЫЙ УЧЕБНИКЪ.

(por Rusoj)

Число копий было ограничено, но
достаточно малое его количество.

Цена 15 копеекъ

ВАРШАВА.

Типо-Литография X. Калыта, ул. Новоземная № 11.

1887.

**Dr. Esperanto
Internacia Lingvo
Antaŭparolo
Kompleta lernolibro
(por Rusoj)**

La 26-an de julio 1887 estas la naskiĝtago de Esperanto. La unua lernolibro, Unua Libro, eldoniĝis en Varsovio ĝuste ĉi tiun daton. En la sama jaro la eldono de Unua Libro rapide sekvis en pola, franca kaj germana lingvoj.